

# KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

[www.ueci.it](http://www.ueci.it)

*"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)*

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -  
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -  
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62  
Stampato da Centro Grafico Pirola-Lissone (MB)

Anno 100 - n.3 /2021  
Luglio/agosto/settembre

## LA JARO DE SANKTA JOZEFO - L'ANNO GIUSEPPINO

(8.12.2020 -8.12.2021)



*Chiesa di San Giuseppe- Cassola (VI)*

La 8-an de Decembro 1870 Papo Pio la 9-a per dekreto *"Quemadmodum Deus"* konfidis la Eklezion al la protekto de Sankta Jozefo kaj proklamis lin "Patrono de la universala Eklezio". Okaze de la 150-jara datreveno, Papo Francisko publikigis la Apostolan Leteron *"Patris corde – Kun patra koro"*. En la Letero Francisko parolas pri li kiel amata patro, la patro en la tenereco, la patro en la obeemo al Dio kaj en la akcepto de Lia volo; edzo kiu brakumas Marian sen antaŭkondiĉoj.

L'8 dicembre 1870 Papa Pio IX nel decreto *"Quemadmodum Deus"* affida la Chiesa alla protezione di San Giuseppe e lo proclama "Patrono della Chiesa universale".

Nella ricorrenza dei 150 anni, Papa Francesco ha emanato la Lettera Apostolica *"Patris corde – Con cuore di Padre"*. Nella Lettera Francesco ne parla come il padre amato, il padre nella tenerezza, il padre nell'obbedienza a Dio e nell'accoglienza della Sua volontà; lo sposo che abbraccia Maria senza condizioni preventive.

Jozefo estas patro el kreiva kuraĝo, kiu manifestiĝas precipe en la malfacilaĵoj kaj kiu naskigas en la homo neatenditajn kapablojn. Sed Jozefo estas ankaŭ la ĉarpentisto, kiu laboris por certigi vivrimedojn al sia familio kaj kiu instruas al ni la valoron, la dignon kaj la ĝojon de la laboro.

Fone de la Apostola Letero, estas la pandemio de Kovid-19, kiu igis nin kompreni la gravecon de la komunaj homoj, kiuj, malproksimaj el la scenejo, praktikas ĉiutage paciencon kaj inspiras esperon, semante kunrespondecon. Ĝuste kiel Sankta Jozefo «la homo malatentata, la homo de la ĉiutaga ĉeesto, modera kaj kaŝita».

Tamen, tiu lia estas «ia elstaremo senkompara en la historio de la savo». En tiu ĉi okazo la Papo anoncis specialan “Jaron de Sankta Jozefo” kaj la eblecon de indulgencoj.

Ĝis la 8-a de Decembro 2021 la kondiĉoj por ricevi la indulgencon estas:

- la konfeseno kaj eŭkaristia komunio;
- la medito, dum almenaŭ 30 minutoj, de ‘Patro Nia’ aŭ la partopreno, dum almenaŭ unu tago, en spirita retiriĝo, kiu enhavu mediton pri Sankta Jozefo;
- la plenumo de ago de mizerikordo korpa aŭ spirita laŭ la ekzemplo de Sankta Jozefo;
- la trapreĝo de la Rozario, en la familioj;
- la konfido de la propraj aktivadoj al la protektado de Sankta Jozefo kaj la alvoko per preĝoj de la propetado de la Metiisto de Nazareto, por ke tiu, kiu serĉas laboron, povu trovi okupitecon kaj por ke ĉies laboro estu pli dignoplena;
- la trapreĝo de la Litanioj al Sankta Jozefo, favore al la Eklezio persekutita kaj por la konsolo de ĉiuj persekutitaj kristanoj;
- la trapreĝo de ajna preĝo laŭrajte aprobita aŭ plenumo de mizerikorda faro honore al Sankta Jozefo, precipe la 19-an de Marto, la 1-an de Majo, en la Festo de la Sankta Familio, la 19-an de ĉiu monato kaj ĉiun merkredon, tago dediĉita al la memoro de la sanktulo.

*(esperantigis F.Fagnani)*

Giuseppe è padre dal coraggio creativo che emerge soprattutto nelle difficoltà e che fa nascere nell'uomo risorse inaspettate.

Ma Giuseppe è anche il carpentiere che ha lavorato per garantire il sostentamento della sua famiglia e che ci insegna il valore, la dignità e la gioia del lavoro.


Sullo sfondo della Lettera apostolica, c'è la pandemia da Covid-19 che ci ha fatto comprendere l'importanza delle persone comuni, quelle che, lontane dalla ribalta, esercitano ogni giorno pazienza e infondono speranza, seminando corresponsabilità. Proprio come San Giuseppe «l'uomo che passa inosservato, l'uomo della presenza quotidiana, discreta e nascosta».

Eppure, il suo è «un protagonismo senza pari nella storia della salvezza». In questa occasione il Papa ha indetto uno speciale “Anno di San Giuseppe” e la concessione di indulgenze.

Fino all'8 dicembre 2021 le condizioni per avere l'indulgenza sono:

- la confessione e la comunione;
- la meditazione, per almeno 30 minuti, del ‘Padre Nostro’ oppure la partecipazione a un ritiro spirituale di almeno una giornata che preveda una meditazione su San Giuseppe;
- compiere un'opera di misericordia corporale o spirituale sull'esempio di San Giuseppe;
- la recitazione del Rosario, nelle famiglie;
- l'affidamento della propria attività alla protezione di San Giuseppe e invocazione con preghiere dell'intercessione dell'Artigiano di Nazareth, affinché chi è in cerca di lavoro possa trovare un'occupazione e il lavoro di tutti sia più dignitoso;
- recitazione delle Litanie a San Giuseppe, a favore della Chiesa perseguitata e per il sollievo di tutti i cristiani perseguitati;
- recitazione di una qualsivoglia orazione legittimamente approvata o atto di pietà in onore di San Giuseppe in particolare il 19 marzo, il 1° maggio, nella Festa della Santa Famiglia, il 19 di ogni mese e ogni mercoledì, giorno dedicato alla memoria del santo.

## 700-a datreveno de la morto de DANTE ALIGHIERI



Agnolo Bronzino (1503-1572)  
Uffizi- Firenze



Dante malamis Papon **Bonifacio la 8-an**, kiun li taksis respondeca pri ĉiuj siaj malbonoj. Krom li, dum sia transtera vojaĝo, li renkontas ses aliajn siatempajn Papojn, sed nur en la Infero kaj Purgatorio kaj ne en la Paradizo. Ĉi tiu lokigo staras kvazaŭ severa kondamno de ilia agado fare de la Poeto.

La Eklezio, tamen, ofte honoris la figuron de Dante Alighieri, konsiderante lian verkon grava elemento de ĝia kultura kaj religia heredaĵo. Inter la granda poeto kaj la kristana penso estas ofteĝaj kontaktpunktoj.

Inter ĉi tiuj estas la celo mem de la Komedio, kiu havas komune kun la kristana mesaĝo la intencon radikale ŝanĝi la homon, por konduki lin el la malluma arbaro de la peko ĝis la mistika rozo de la sankteco.

Dante odiava papa **Bonifacio VIII**, da lui ritenuto responsabile di tutti i suoi mali. Oltre a lui, nel suo viaggio ultraterreno, incontra altri sei Papi del suo tempo, ma esclusivamente nell'Inferno e nel Purgatorio e non nel Paradiso. Tale collocazione è come una severa condanna del loro operato da parte del Poeta.

La Chiesa, però, ha onorato spesso la figura di Dante Alighieri, considerando la sua opera un elemento importante del suo patrimonio culturale e religioso. Tra il sommo poeta e il pensiero cristiano vi sono numerosissimi elementi di contatto.

Tra questi il fine stesso della Commedia, che ha in comune col messaggio cristiano l'intento di cambiare radicalmente l'uomo, di portarlo dalla selva oscura del peccato alla rosa mistica della santità.

Okaze de la lastaj datrevenoj de Dante, la Papoj dediĉis gravajn paŝtist-instruajn tekstojn al la granda poeto.

Per la encikliko *"In praeclara summorum"*, (Aprilo 1921), **Benedikto la 15a** solenis la sesan jarcentan jubileon de la morto de Dante. Tiukaze, la Papo ankaŭ akcelis la rebonigon de la templo en Raveno, kiu enhavas la tombon de Dante.

La Papo volis reliefigi "la intiman unuiĝon de Dante kun la Katedro de Petro" kaj asertis, ke la fundamentaj veroj de la katolika Eklezio estis esprimitaj en la poemo.

Papo Benedikto la 15-a motivigis la atakojn de la poeto kontraŭ la tiama Eklezio: «Kiu povus nei, ke tiutempe estis aferoj por riproĉi al la pastraro?».

En la sepa centjariĝo de la naskiĝo de Dante, ankaŭ Papo **Paŭlo la 6-a**, per la apostola letero *Altissimi cantus* (1965), proklamis la profundan intereson de la Eklezio por Dante.

La Papo fondis katedron pri studoj de Dante ĉe la Katolika Universitato de Milano.

La 19-an de Septembro de la sama jaro li sendis oran krucon al Raveno por la tombo de la poeto, kiel signo de la resurekto, kiun Dante kredkonfesis, kaj la 14-an de Novembro ora laŭrokrono estis enfiksita en la Baptejo de Sankta Johano en Florenco.

Fine, konklude de la Dua Vatikana Koncilio, la Papo donis al ĉiuj partoprenantoj valoran eldonadon de la Dia Komedio.

Paŭlo la 6-a lin alkalkulis al la grandaj kristanaj poetoj. «Dante estas nia», rekonfirmis Papo Montini kaj asertis, ke estas devo de la Eklezio rekoni Dante'n kiel sian kaj ke zorgema studo pri lia verko estis necesa por malkovri la «netakseblajn trezorojn de la kristanaj penso kaj sento».

Kiam li estis kardinalo **Benedikto la 16-a** memorigis kaj citis la grandan poeton. La 8-an de Decembro 2006, dum la Anĝelus, Benedikto la 16a citis la lastan kanton de Paradizo: «Virgolino Patrino, filino de via Filo, /

In occasione dei più recenti anniversari danteschi, i pontefici hanno dedicato al sommo poeta importanti documenti magisteriali.

Nell'enciclica *"In praeclara summorum"*, (aprile 1921), **Benedetto XV** celebrò il VI centenario della morte di Dante.

Per l'occasione il pontefice aveva anche promosso il restauro del tempio a Ravenna che custodisce la tomba di Dante.

Con l'enciclica il papa volle evidenziare «l'intima unione di Dante con la cattedra di Pietro» e affermò che nel poema erano espresse le verità fondamentali della Chiesa cattolica. Papa Benedetto XV giustificava gli attacchi del poeta contro la Chiesa del tempo: «Chi potrebbe negare che in quel tempo vi fossero delle cose da rimproverare al clero?».

Nella ricorrenza del VII centenario della nascita di Dante, anche Papa **Paolo VI** con la lettera apostolica *"Altissimi cantus"* (1965), proclamava il profondo interesse della Chiesa per la figura di Dante.

Il pontefice istituiva, presso l'Università Cattolica di Milano, una cattedra di studi danteschi. Il 19 settembre dello stesso anno aveva inviato per la tomba del poeta a Ravenna una croce d'oro, come segno della risurrezione che Dante professava, e il 14 novembre era stata incastonata nel Battistero di San Giovanni a Firenze un'aurea corona d'alloro.

Infine, a conclusione del concilio Vaticano II, il papa aveva donato a tutti i partecipanti una pregiata edizione della Divina Commedia. Paolo VI lo annoverava tra i grandi poeti cristiani. «Dante è nostro», ribadì papa Montini e affermò che è un dovere della Chiesa riconoscere Dante come proprio e che era necessario uno studio accurato della sua opera per scoprirne gli «inestimabili tesori del pensiero e del sentimento cristiano».

Già da cardinale **Benedetto XVI** ricordava e citava il sommo poeta. L'08/12/2006, all'Anĝelus, Benedetto XVI citò l'ultimo canto del Paradiso: «Vergine Madre, figlia del tuo Figlio, /

humila kaj pli alta ol estaĵo, / fiksita termino de eterna konsilo».

**Johano Paŭlo la 2-a**, en sia parolado de la 30-a de Majo 1985 ĉe la inaŭguro de la ekspozicio pri Dante en Vatikano, deklaris: «Baldaŭ mi vidos ĉi tiun ekspozicion kaj mi ankaŭ faros vojaĝon tra la dezerteco de la fajra urbo, tra la pekliberigo el la kulpoj, ĝis la supera ĝojo de la blanka rozo».

Okaze de la 750 jaroj post la naskiĝo de la Poeto, **Papo Francisko** esprimis la esperon, ke la figuro de Dante Alighieri kaj lia verko estu denove komprenataj kaj valorigataj kaj proponis legi la Komedion kiel «bonegan itineron, eĉ, kiel veran pilgrimadon kaj personan kaj internan, ĉu komunuman, eklezian, socian kaj historian». Li, do, indikis la figuron de la Plejalta Poeto al siaj samtempuloj, proponante lin kiel «profeton de espero, heroldon de la ebleco de elaĉeto, de la liberigo, de la profunda ŝanĝo de ĉiu viro kaj virino, de la tuta homaro».

(esperantigis F.Fagnani)

umile ed alta più che creatura, / termine fisso d'eterno consiglio»

**Giovanni Paolo II**, nell'intervento del 30 maggio 1985 all'inaugurazione della mostra di Dante in Vaticano affermò: «Fra poco vedrò questa esposizione e compirò anch'io un viaggio tra la desolazione della città del fuoco, attraverso l'espiazione liberatrice dalle colpe, fino alla suprema gioia della candida rosa».

Per i 750 anni dalla nascita del Poeta, **Papa Francesco** ha auspicato che la figura dell'Alighieri e la sua opera siano nuovamente comprese e valorizzate e ha proposto di leggere la Commedia come «un grande itinerario, anzi come un vero pellegrinaggio sia personale e interiore, sia comunitario, ecclesiale, sociale e storico». Ha, quindi, additato la figura del Sommo Poeta ai contemporanei, proponendolo come «profeta di speranza, annunciatore della possibilità del riscatto, della liberazione, del cambiamento profondo di ogni uomo e donna, di tutta l'umanità».

## La esperantaj tradukistoj de la Dia Komedio

**Kálmán KALOCSAY** (1891-1976) estis hungara Esperanta poeto kaj fama tradukisto.

**Giovanni PETERLONGO** (1856-1941) estis itala politikisto, esperantisto kaj tradukisto. Inter la jaroj 1922 kaj 1923 li estis Urbestro de Trento. Li famiĝis kiel aŭtoro de la Esperanta traduko de la Dia Komedio, unuafoje eldonita en 1963.

**Enrico DONDI** (1935-2011) estis itala esperantisto kaj tradukisto. Li esperantigis multajn klasikajn verkojn el la itala literaturo: Dante Alighieri (*Dia Komedio*), Torquato Tasso (*Liberrigita Jerusalemo*), Ludovico Ariosto (*Kolera Orlando*).

**Kálmán KALOCSAY** (1891-1976) è stato un poeta esperantista ungherese e famoso traduttore.

**Giovanni PETERLONGO** (1856-1941) è stato un politico italiano, esperantista e traduttore. Tra il 1922 e il 1923 fu sindaco di Trento. Divenne famoso come l'autore della traduzione in Esperanto della Divina Commedia, pubblicata per la prima volta nel 1963.

**Enrico DONDI** (1935-2011) è stato un esperantista e traduttore italiano. Ha tradotto in Esperanto molte opere classiche della letteratura italiana: Dante Alighieri (*Divina Commedia*), Torquato Tasso (*Gerusalemme Liberata*), Ludovico Ariosto (*l'Orlando Furioso*).

## KREDO kaj SOCIO

*“En la Evangelioj Sankta Jozefo aperas kiel viro forta, kuraĝa, laborema, sed en lia animo evidentiĝas granda tenereco, kiu ne estas la virto de la malfortulo sed, kontraŭe, ĝi montras animan fortecon kaj kapablon de atento, de kompato, de vera malfermiĝo por la alia, kapablon ami. Ni ne devas timi la bonecon, la tenerecon”.*

*Papo Francisko*

*“Nei Vangeli San Giuseppe appare come un uomo forte, coraggioso, lavoratore, ma nel suo animo emerge una grande tenerezza, che non è la virtù del debole, anzi, al contrario, denota fermezza d’animo e capacità di attenzione, di compassione, di vera apertura all’altro, capacità di amore. Non dobbiamo avere timore della bontà, della tenerezza”.*

*Papa Francesco*



### LA TENERECO

Estas malfacile difini vorton kiel tenereco. Ĝenerale oni atribuas ĝin al la ina naturo, dum por tiu vira, ĝi estas konsiderata malvaloro, signo de malforteco.

La tenereco estas la animo de la mondo, estas sento, kiu vibrigas nin en la sperto de la amo kaj kiu igas nin gustumi la belecon de la vivo.

Ĝi estas sento nepalpebla, kiu povas subite

### LA TENEREZZA

È difficile da definire un termine come tenerezza. In genere lo si attribuisce alla natura femminile mentre nel caso di quella maschile è considerato un disvalore un segno di debolezza. La tenerezza è l’anima del mondo è un sentimento che ci fa vibrare nell’esperienza dell’amore e ci fa assaporare la meraviglia della vita.

È un sentimento impalpabile che può all’im-

manifestiĝi sur iu vizaĝo, fiksiĝi en iu rigardo aŭ en kareso, komunikiĝi per manpremo.

Plue, ĝi estas interna stato, kondiĉo de la koro simila al la dolĉeco kaj al la komprenemo, sed kiu venas antaŭ la unua kaj kiu ne nepre transformiĝas en la duan.

La tenereco estas la sojlo de la amo kaj eble reprezentas ĝian plej puran esprimon.

Sen la humo de la tenereco ne ekzistas la afekcia vivo.

Oni povas senti tenerecon por la propra koramikino, por la edzino aŭ la edzo, por amiko, kiu reaperas post longaj jaroj. Oni povas senti tenerecon por ĉio, kio estas viva kaj senpaga, por ĉio, kio apartenas al nia pasinteco, por ĉio, kio kortuŝas nin en la mallonga momento de nia nuntempo.

La tenereco necesas esti komprenata, interpretata kaj juĝata ĝisfunde.

Unuavice, oni povas postuli ĝin de neniu, ĉar ĝi estas sento natura: aŭ oni posedas ĝian ŝlosilon en la intimaĵo aŭ ne estas maniero altrudi ĝin al si mem, eĉ ne rilate al amata persono.

Tenereco estas sento malfacile klarigebla sed, malgraŭ tio, ĝi povas movi la mondon. Ĝi postulas altruismon sen prikalkuloj. Tenereco estas strebado, serĉo de la alia, akcepti lin, sin doni kaj kundividi.

*(esperantigis F.Fagnani)*

provviso trapelare da un volto, fissarsi in uno sguardo o in una carezza, comunicarsi in una stretta di mano .

Ancora è uno stato interiore, una condizione del cuore simile alla dolcezza e alla comprensione ma che viene prima dell'una e non necessariamente si trasforma nell'altra.

La tenerezza è la soglia dell'amore e forse rappresenta la sua espressione più pura. Senza humus della tenerezza non c'è vita affettiva.

Si può provare tenerezza per la propria ragazza, per la moglie o il marito, per un amico che si è fatto vivo dopo tanti anni. Si può provare tenerezza per tutto ciò che vivo e gratuito, per tutto ciò che appartiene al nostro passato, per tutto ciò che ci commuove nel breve istante del nostro presente.

La tenerezza ha bisogno di essere capita, interpretata e valutata fino in fondo.

Intanto non si può esigere da nessuno perché è un sentimento naturale o se ne possiede la chiave nell'intimo o non c'è modo di imporsela, nemmeno nei confronti di una persona amata.

La tenerezza è un sentimento difficile da spiegare ma nonostante questo può muovere il mondo. Esige altruismo privo di calcoli. Tenerezza è tendere, è cercare l'altro, accoglierlo, donarsi e condividere.

**Don Salvatore Rinaldi**



En la pentraĵo de artisto Ambrogio Figino (1553-1608), konservata en la preĝejo de Sankta Marko en Milano, la tenera rigardo de Jozefo sin vualas per malĝojo.

Li rigardas tiun infanon konsciante pri la sorto, kiu lin atendas, li kundividis kun Maria la misteron de tiu ĉi filo kaj la suferon, kiun ŝi sentos.

Nel quadro del pittore Ambrogio Figino (1553-1608), conservato presso la Chiesa di San Marco a Milano, lo sguardo tenero di Giuseppe si vela di tristezza.

Egli guarda questo bambino consapevole del destino che lo attende, condivide con Maria il mistero di questo figlio e intuisce il dolore e la sofferenza che lei proverà.

## NIA ETA PARNASO

### SEME DI SENAPE

Penetra il cuore.  
Ingrandiscilo.  
Fallo grotta  
Alla Tua parola.  
Voce Luce Pace  
A fecondare  
Seme di senape  
A germoglio d'Amore.  
Ed aspetto.  
Aspetto che fiorisca Primavera  
vera

### A BETANIA

All'ombra di un antico  
Pergolato siamo stati.  
Come vecchi amici.  
Tu ed io.  
Mi hai parlato di Te  
Ed io di me.  
In silenzio.  
Col cuore tra le mani.

Ho letto nei tuoi occhi  
La follia dell'Amore,  
ed ho pianto le lacrime del  
mondo.

*Rita Julianis*

### SINAPA SEMO

Penetru la koron  
Pligrandigu ĝin  
Igu ĝin kaverno  
Por via vorto  
Voĉo Lumo Paco  
Por fekundigi  
Sinapan semon  
Kiel burĝonon de amo  
Kaj mi atendas.  
Mi atendas ke ĝi floros prin-  
tempe

### EN BETANIO

En la ombro de antikva  
Pergolo ni estis.  
Kiel malnovaj amikoj  
Vi kaj mi.  
Vi parolis al mi pri vi  
Kaj mi pri mi.  
En silento.  
Kun koro inter niaj manoj.

Mi legis en via okuloj  
La frenezon de Amo  
Kaj mi ploris per mond-  
larmoj

*Esperantigis Renato Corsetti  
kaj M.G.Valente*





## LA BELECO DE LA KREDO



**Aŭlo Paŭlo la 6-a**, konata ankaŭ kiel **Aŭlo de la Papaj Aŭdiencoj** aŭ **Aŭlo Nervi** (el la nomo de ĝia projektisto, Pier Luigi Nervi) estis inaŭgurita de Papo Montini la 30-an de Julio 1971.

“Necesis liberigi la Bazilikon de Sankta Petro el la alfluo, iĝinta kutima, de la heterogena kaj vigla amaso, kiu plenigas niajn ĝeneralajn aŭdiencojn, kaj por proponi al niaj vizitantoj akcepto-salonojn pli taŭgan...”

Granda konstruaĵo ne pro amo al povo aŭ al pompo, ne esprimo de monumenta fiereco, aŭ ornama vantaĵo, sed la konscio, ke ankaŭ kiel etaj kreitaĵoj kaj humilaj kristanoj ni servas planon grandegan kaj eĉ senfinan, iun penson dian.

Kaj la kreemo de la kristana arto havas en si mem la elanon esprimiĝi per signoj grandaj kaj majestaj”.

Antaŭ la salono staras granda enirhalo kaj ĝi povas gastigi ĝis 12 000 homojn. La konstruaĵo estas karakterizita de aparta ovalforma volbo, kiu altiras la atenton de la publi-

**L’Aula Paolo VI**, nota ankaŭ kiel **Aula delle udienze Pontificie** o **Aula Nervi** (dal nome del suo progettista, Pier Luigi Nervi) fu inaugurata da Papa Montini il 30 giugno 1971.

«C’era bisogno di liberare la Basilica di San Pietro dall’afflusso divenuto consueto della moltitudine eterogenea e vivace, che affolla le nostre udienze generali, e per offrire ai nostri visitatori un’aula d’accoglienza più adatta... Una grande costruzione non per amore di potenza o di fasto, non un’espressione di orgoglio monumentale, o vanità ornamentale, bensì la coscienza che pur piccole creature e umili cristiani serviamo un disegno immenso e perfino infinito, un pensiero divino. E la creatività dell’arte cristiana ha di suo lo slancio a esprimersi in segni grandi e maestosi».

L’aula è preceduta da un grande atrio ed è capace di ospitare fino a 12 000 persone.

L’edificio è caratterizzato dalla particolare volta parabolica che concentra l’attenzione

ko al la podio.

La naturan lumigadon certigas la du grandaj ovalaj fenestroj, lokitaj ĉe la flankaj muroj; ili estas fermitaj per plurkoloraj vitraloj faritaj de la hungara artisto János Hajnal.

Aldonitaj al la ĉefa salono estas aliaj salonoj, inter kiuj tiu de la Sinodo de la episkopoj kaj kelkaj por reprezentado uzataj de la Papo. Sur la podio elstaras la granda skulptaĵo de la Resurekto, verko de artisto **Pericle Fazzini**, kiu bezonis kvin jarojn por ĝia realiĝo.

Li estis elektita post kvar jaroj de selektado kaj oni disponigis al li la preĝejon de Sankta Laŭrenco in Piscibus por la realigo de la verko.

La skulptaĵo etendiĝas laŭ longo de 20 metroj kaj okupas la tutan centran parton de la fona muro de la salono. Centre troviĝas la resurektinta Kristo kiu, elstaranta, leviĝas el nedifinita ĥaoso reprezentanta la morton.

Liaj longaj haroj kaj la barbo estas movitaj de vento kiu blovas el maldekstro dekstren, liaj brakoj estas malfermitaj kaj la kavigita vizaĝo travidigas internan suferon.

La ceteraj partoj de la skulptaĵo estas aro de naturaj elementoj kunigitaj kaj ne bone difinitaj, kiel rokoj, sekaj branĉoj kaj radikoj.

La statuo estis inaŭgurita la 28-an de Septembro 1977.

*(esperantigis F.Fagnani)*

del pubblico verso il palco.

L'illuminazione naturale è garantita dalle due grandi finestre ovali, poste sulle pareti laterali; esse sono chiuse da vetrate policrome opera dell'artista ungherese János Hajnal.

Annesse all'aula principale vi sono altre sale, tra le quali quella del Sinodo dei vescovi e alcune di rappresentanza usate dal Papa. Sul palco svetta la grande scultura della Resurrezione dell'artista **Pericle Fazzini** il quale impiegò 5 anni per la sua realizzazione.

Egli fu scelto dopo quattro anni di selezioni e gli fu messa a disposizione la Chiesa di San Lorenzo in Piscibus per la realizzazione dell'opera.

La scultura si estende per una larghezza di 20 metri e occupa tutta la sezione centrale della parete fondale dell'aula. Al centro si trova il Cristo risorto che, svettante, emerge da un caos indefinito che raffigura la morte.

I suoi lunghi capelli e la barba sono spostati da un vento che soffia da sinistra verso destra e le sue braccia sono aperte e il volto scavato fa trasparire una sofferenza interiore.


Il resto della scultura è un insieme di elementi naturali fusi fra di loro e non ben definiti come rocce, rami secchi e radici.

La statua è stata inaugurata il 28 settembre 1977.

*Pier Luigi Nervi*



*Pericle Fazzini*



## PAROLU AL MI EN VIA LINGVO

### LA NOMADA PASTRO

Un tagon **pastro Mario Riboldi**, paroĥestro en paroĥo ĉe la limo inter la provincoj de Milano kaj Pavia, vidis kelkajn pasantajn karovanojn kaj pensis: “Kiu portas la Evangelion al tiuj ĉi homoj?” Tiam komenciĝis lia historio. De Kardinalo Colombo de Milano li ricevis la permeson iri loĝi kun ili en ruldomo. Dum jardekoj li vivis kun ili.



Un giorno **don Mario Riboldi**, parroco in una parrocchia al confine fra le province di Milano e Pavia, vide passare delle carovane e pensò: “Chi porta il Vangelo a questa gente?”. Da allora è cominciata la sua storia. Dal Cardinale Colombo di Milano ottenne il permesso di andare a vivere con loro

in una roulotte. Per decenni ha vissuto con loro.

La preĝejo estis kontenero kaj la tabernaklo estis kurteno mane kudrita de la virinoj.

La Chiesa era un container e il tabernacolo una tenda cucita a mano dalle donne.

Li vojaĝis laŭ ĉiuj stratoj de Italio kaj de Eŭropo ankaŭ nur por renkonti ilin, por festi kun ili, por bapto, por geedziĝo, por momento de preĝo aŭ por legado de la Biblio.

Ha viaggiato lungo tutte le strade d'Italia e d'Europa anche solo per incontrarli, per far festa con loro, per un battesimo, per un matrimonio, per un momento di preghiera o la lettura della Bibbia

Don Mario estis difinita kiel la lingvisto de tiuj ĉi komunumoj. Por li la lingvo estis ne lingvistika studo de idiomo malsama ol la lia, sed ĝi estis studo celanta la komunikadon de la Evangelio en la lingvo de tiuj komunumoj, por ke Jesuo povu eniri en ilian koron.

Don Mario è stato definito il linguista di queste comunità. Per lui la lingua non era uno studio linguistico di un idioma diverso dal suo, ma era finalizzato a comunicare il Vangelo nella lingua di queste comunità affinché Gesù potesse entrare nel loro cuore. Ha inventato canzoni religiose, ha tradotto i salmi e il Vangelo in cinque differenti lingue dei sinti e dei rom, tra cui il romanes.

Li inventis religiajn kantojn, li tradukis la psalmojn kaj la Evangelion en kvin malsamajn lingvojn de la sintioj kaj romaoj, inter kiuj la “romanes”.

Tiu ĉi lingvo enhavas vortojn kiuj devenas el la persa, el la kurda, el la armena, el la greka lingvo; ili atestus la vojon sekvitan de tiuj popoloj el la hinda subkontinento ĝis Eŭropo.

Questa lingua contiene termini che derivano dal persiano, dal curdo, dall'armeno, dal greco testimoniando il tragitto percorso da queste popolazioni dal subcontinente indiano fino in Europa.

Li estas aŭtoro de la libro “La Biblio rakontata al Romao kaj al Sintio” kaj de aliaj libroj.

È autore del libro “La Bibbia raccontata al Rom e al Sinto” e di altri libri. Per quasi 40 anni fu incaricato diocesano della pastorale dei nomadi. È scomparso all'età di 92 anni l'8 giugno 2021.

Dum preskaŭ 40 jaroj li estis dioceza komisiito por la nomadoj.

Li forpasis la 8-an de Junio 2021, je la aĝo de 92 jaroj.

## UNUA MONDA TAGO DE LA GEAVOJ KAJ DE LA GEMALJUNULOJ



*Sankta Familio kun Jesuo, Maria, Josefo, sanktaj Anna kaj Joakimo  
Joseph Paelinck (1800) - Muzeo J.Paul Getty*

La 25-an de Julio oni solenis la unuan mondan tagon de la geavoj kaj de la gemaljunuloj, deziratan de Papo Francisko. Oni solenos ĝin ĉiujare la kvaran dimanĉon de Julio koincide kun la festo de la geavoj de Jesuo, Sanktaj Anna kaj Joakimo, kiujn oni memorigas la 26-an de Julio. La celo estas pripensi la valoron de ĉi tiuj figuroj, kiuj reprezentas niajn radikojn kaj transdonas la tradiciojn.

En la prediko legita de monsinjoro Fisichella dum la celebrado de la Meso, tri estas la verboj, kiujn Papo Francisko uzis por priskribi la rilaton inter la generacioj:

**vidi, kundividi kaj gardi.**

**Vidi: necesas atenta rigardo.** La geavoj havas okulojn atentajn kaj plenplenajn de tenereco ... ni ĉiuj restis sur la genuoj de la geavoj, kiuj tenis nin enbrake.

Il 25 luglio si è celebrata la prima giornata mondiale dei nonni e degli anziani voluta da Papa Francesco. Si celebrerà ogni anno la quarta domenica di luglio in concomitanza con la festa dei nonni di Gesù, Santi Anna e Gioacchino, che vengono ricordati il 26 luglio. L'obiettivo è quello di riflettere sul valore di queste figure che rappresentano le nostre radici e tramandano le tradizioni.

Nell'omelia letta da mons. Fisichella durante la celebrazione della Messa tre sono i verbi che Papa Francesco ha utilizzato per descrivere il rapporto tra le generazioni:

**vedere, condividere e custodire**

**Vedere: c'è bisogno di uno sguardo attento.** I nonni hanno avuto occhi attenti e colmi di tenerezza ... siamo passati tutti dalle ginocchia dei nonni che ci hanno tenuto in braccio.

**Kundividi tion, kio ni estas kaj tion, kion ni havas.** Necesas kundividi la komunan trezoron de la vivo, revu kune, superi la konfliktojn inter generacioj por pretigi la estontecon de ĉiuj. Sen tiu ĉi interligo plimultiĝos la rompitaĵoj, la solecoj la egoismoj.....

**Gardi: nenio kaj neniu devas esti formetita.**

Ili gardis nin laŭ la vojo de nia kreskado, nun estas nia la tasko gardi ilian vivon kaj malplipezi iliajn malfacilaĵojn.

**Preĝo por la Sanktaj Anna kaj Joakimo, kiun trapreĝis Papo Benedikto la 16-a**

Sinjoro Jesuo, vi naskiĝis de la Virgulino Maria, filino de Sankta Joakimo kaj Sankta Anna. Prizorgu kun amo la geavojn de la tuta mondo. Ilin protektu: ili estas fonto de riĉiĝo por la familioj, por la Eklezio kaj por la tuta societo. Subtenu ilin: ankaŭ dum maljuneco ili daŭre estu por siaj familioj fortikaj kolonegoj de evangelia kredo, gardantoj de la noblaj idealoj de la familio, vivantaj trezoroj de solidaj religiaj tradicioj.

Igu, ke ili estu majstroj de saĝo kaj de valoroj, ke ili transdonu al la estontaj generacioj la fruktojn de sia homa kaj spirita sperto.

Sinjoro Jesuo, helpu la familiojn kaj la societojn valorigi la ĉeeston kaj la rolon de la geavoj.

Neniam ili estu ignorataj aŭ ekskluditaj sed ili trovu ĉiam respekton kaj amon.

Helpu ilin serene vivi kaj senti sin akceptataj dum ĉiuj jaroj de sia vivo, kiujn Vi volas al ili konsenti.

Maria, Patrino de ĉiuj vivantoj, protektu ĉiam la geavojn, akompanu ilin dum ilia tera pilgrimado, kaj kun via preĝo igu, ke ĉiuj familioj rekuniĝu iun tagon en la ĉiela patrujo kie vi atendas la tutan homaron por la granda brakumo de la senfina vivo.

Amen.

*(esperantigis N.Cescotti)*

**Condividere ciò che siamo e ciò che abbiamo.** C'è bisogno di condividere il tesoro comune della vita, di sognare insieme, di superare i conflitti tra generazioni per preparare il futuro di tutti. Senza questa alleanza aumenteranno i legami spezzati, le solitudini, gli egoismi.....

**Custodire: nulla e nessuno va scartato.**

Essi ci hanno custodito lungo il cammino della crescita ora tocca a noi custodire la loro vita e alleggerire le loro difficoltà.

**Preghiera per i Santi Anna e Gioacchino recitata da Papa Benedetto XVI**

Signore Gesù, tu sei nato dalla Vergine Maria, figlia di San Gioacchino e Sant'Anna.

Guarda con amore ai nonni di tutto il mondo. Proteggili: sono fonte di arricchimento per le famiglie, per la Chiesa e per tutta la società. Sostienili: anche nella vecchiaia continuano a essere per le loro famiglie pilastri robusti di fede evangelica, custodi dei nobili ideali della famiglia, tesori viventi di solide tradizioni religiose.

Fa' che siano maestri di sapienza e di valori, che trasmettano alle generazioni future i frutti della loro matura esperienza umana e spirituale.

Signore Gesù, aiuta le famiglie e la società a valorizzare la presenza e il ruolo dei nonni.

Mai siano ignorati o esclusi, ma incontrino sempre rispetto e amore.

Aiutali a vivere serenamente e a sentirsi accolti per tutti gli anni della vita che tu loro concedi.

Maria, Madre di tutti i viventi, proteggi sempre i nonni, accompagnali nel loro pellegrinaggio terreno, e con la tua preghiera fa' che tutte le famiglie si riuniscano un giorno nella patria celeste, dove tu attendi tutta l'umanità per il grande abbraccio della vita senza fine.

Amen.

## SCIIGOJ EL ESPERANTA MONDO



Karaj geamikoj,  
la 30-an de Majo la Bicikla Rondveturo tra Italujo trairis urbon Cormano kaj pasis ĝuste antaŭ mia domo.

La antaŭan tagon mi pretigis perfekte la materialon kaj tiumatene, tre frue, mi metis ekster mia kradpordo kaj la naŭ panelojn, plurfoje uzatajn en Romo dum la beno Urbi et Orbi, kaj la simpatian tolostrion kun la slogano:

**"SE VI PENSAS PRI LA MORGAŬO, HODIAŬ LERNU ESPERANTON!"**

Mi lokiĝis ĉe la kontraŭa flanko de mia domo kaj mi faris kvindek da fotoj al la biciklistoj, ĉiam esperante foti la rozkoloran trikoton.

La naŭ paneloj kaj la simpatia tolostrio havis grandegan sukceson; multaj aŭtomobiloj de la sekvantaro malrapidiĝis antaŭ miaj skribaĵoj por legi ilin.

Laŭ la tuta strato estis tre multe da personoj kiuj, atendante la trairon de la biciklistoj, legis kaj komentis ilin.

Do, sukceso!!!!

*(esperantigis Francesco Fagnani)*

Cari amici,

il 30 maggio il Giro d'Italia ha attraversato Cormano ed è passato proprio davanti alla mia casa.

Il giorno prima ho preparato tutto il materiale a puntino e questa mattina, molto presto, ho messo fuori dal mio cancello sia i 9 pannelli reduci da Urbi et Orbi sia il simpatico striscione con lo slogan:

**"SE PENSI AL DOMANI, OGGI IMPARA L'ESPERANTO !"**

Mi sono piazzato sul lato opposto della mia casa ed ho fatto una cinquantina di foto ai vari corridori che passavano, sempre sperando di fotografare la maglia rosa.


I nove pannelli e il simpatico striscione hanno avuto un grandissimo successo; parecchie macchine del seguito, davanti alle mie scritte, rallentavano l'andatura per leggere.

Lungo tutto la strada c'era un' immensità di gente che, aspettando i vari passaggi, li leggeva e commentava.

Quindi un successo !!!!!

*Gianni Conti*

"MI DIRIS AL VI, KE VI DEVIS LEGI PLI MULJE!"



LA VINJETOJ  
DE  
PLINIO LA URSETO  
KAJ  
LUNDO LA KUNIKLO

[https://www.instagram.com/plinio\\_8.5/?hl=it](https://www.instagram.com/plinio_8.5/?hl=it)  
©Gemma Arosio



Universitata profesoro decidas ekskursi per boato kun maristo.

Post iom da tempo la profesoro diras al la maristo: - Ĉu vi legis iam "La Gefianĉoj"?

La boatisto respondas: -Ne ... mi estas malriĉulo kaj ĉiam mi devis remi.

La profesoro respondas: - Vi perdis duonon de via vivo.

Post ioma tempo la profesoro demandas: - Ĉu vi legis la poemon "Pri la tomboj"?

La boatisto respondas: - Mi devis fiŝkapti kaj mi ne havis tempon.

La profesoro respondas: - Vi perdis duonon de via vivo.

Post iom da tempo la ĉielo nubiĝas kaj leviĝas forta vento, kiu renversas la boaton.

La maristo demandas al la profesoro: - Ĉu vi kapablas naĝi?

La profesoro respondas: -Ne! Mi devis legi!

La boatisto rebatas: - Vi perdis vian tutan vivon!!!

Un professore universitario decide di fare una gita in barca con un marinaio.

Dopo un po' il letterato dice al marinaio:

-Lei ha mai letto i "Promessi sposi"?

Il barcaiolo risponde: -No ... io sono povero e ho sempre dovuto remare.

Il letterato risponde: - Lei ha perso metà della sua vita!

Dopo un po' il letterato chiede: - Ha mai letto i Sepolcri?

Il barcaiolo risponde: - Io dovevo pescare e non avevo tempo!

Il letterato risponde: - Lei ha perso metà della sua vita!

Dopo un po' il cielo diventa nuvoloso e si alza un forte vento che rovescia la barca.

Il marinaio chiede al letterato: - Lei sa nuotare?

Il letterato risponde: - No! Io dovevo leggere!

Il barcaiolo ribadisce: - Lei ha perso tutta la sua vita!!!

**COMITATO CENTRALE U.E.C.I.**

Presidente: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942  
e-mail : katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: Francesco FAGNANI, Via Bartolomeo Eustachi 47, 20129 Milano  
Segret./Cassiere: fra Pierluigi SVALDI, Convento del SS.Redentore Piazza S. Francesco, 1 Pergine Valsugana (TN)

Responsabile dei congressi: G.CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) - tel. 02.66301958

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, via Santa Bernadette 6, 00167 Roma  
Addetto alla logistica: Felice SOROSINA, Via Sarnico 17, 24060 Tavernola (BG) – tel. 3492191838

Consigliere: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consigliere: Giovanni GAZZOLA: Via Cendrole, 32 - Spineda, 31039 Riese Pio X (TV)

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di Katolika Sento vanno spedite al presidente UECE.

Associato ordinario con Katolika Sento (SO) . . . . .	€ 22,00
Associato giovane con Katolika Sento (SG) . . . . .	€ 11,00
Associato familiare senza Katolika Sento (SF) . . . . .	€ 11,00
Associato ordinario con Espero Katolika (SOE) . . . . .	€ 43,00
Associato sostenitore senza Espero Katolika SS) . . . . .	€ 44,00
Associato sostenitore con Espero Katolika (SSE) . . . . .	€ 65,00
Offerta minima per Katolika Sento (AK) . . . . .	€ 10,00
Solo abbonamento a Espero Katolika (AE) . . . . .	€ 21,00

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato.

Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte. I gruppi locali con almeno 10 soci trattengono € 2,10 per l'associato ordinario e € 1,05 per l'associato giovane o familiare.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I. codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPII-TRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di Katolika Sento è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

La redazione è composta da:

Norma Cescotti Covelli, Francesco Fagnani, Tiziana Fossati  
Chiara Franchitti, Giovanni Gazzola, Carlo Sarandrea, Maria Grazia Valente